



Abono por unu jaro : * Eldonata de :
*
18 FF (Francio : 15 FF) * Cercle espérantiste de l'Agenais
*
- aŭ egalvaloro - * F 47340 LAROQUE TIMBAUT
*
al la ĉi-apuda pĉk. * Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux

Jen la 40a (novseria) numero de bulteno, kies modesteco iĝas malpli kaj malpli okulfrapa, precipe al tiuj, kiuj de la komenco ĝin ricevas. Iom post iom ĝia formulo - tiu de la iama "LJP" - evidentiĝis plej oportuna al E-uzantoj, kiuj ne povas aŭ ne volas pagi altajn abonprezojn kaj ne timas malortodoksaĵojn : iomete da pipro en tro ofte sensuka E-gazetaro...

Nun relative multaj geLAŬTuloj emas kontribui al sia bulteno. Tiel, eĉ se en la LAŬTejo plagas ununura persono redaktanto-presanto-administranto-balaisto*, ĉirkaŭ "Laŭte!" vivas kaj interŝanĝas amika kolektivo, kiun ne malhelpas la interesociaj vandoj aŭ la opinimalsameco... Male...(Tion ĉiam almenaŭ deziris la stenciltajpanto).

En tiu 40a reliefigas zorgoj pri estonteco de nia mondo (Eŭropo en danĝero, laŭt-ekologio...) kaj de nia lingvo-movado ("Ĉu ni estas pretaj?", "Ĉu plibonigi Esperanton?", E-vivo, "Jus aperis", lingva angulo...), dum ni plu felietonas kun Alfa-Beta en Azio en 1930, kaj aperas la unua paĝo

*)Nur pri tio tiu persono iom fakulas!

 * N I A L I N G V O *

Pri JUS (bonvolu konsulti la PAG n° 90, p. 124, linio -9)

Estas eraraĵ jenaj esprimoj trovitaj en diversaj revuoj, libroj, ktp :

"Jus antaŭ nia foriro, ni..."

"Jus enirAS la profesoro..."

"Jus kiam la ĉinaj esperantistoj pasigis sian Printempan Feston, ili bonvenigis amikan senditon de UEA."

Oni diru : "ĝuste antaŭ..." , "ĝuste kiam..."

En PAG : "li foriris ĝuste kiam mi alvenis" (temas pri santempaj agoj).

"li foriris jus, kiam mi alvenis" (li foriris momenton antaŭ ol mi alvenis).

Ne eblas erari, se oni memoras, ke oni trovas ĉiam kune :
 "JUS IS", ke temas pri "perfekta tempo", ke ĝi certigas la finon de la ago. (Pro tio estas superflue uzi jus kun kompleksaj verboformoj).

LENTAIGNE.

Jen la 40a...(daŭrigo)

dediĉita al infanoj (p.34). Krome, bilancas SAT-broŝurservo kaj "Laŭte!", certe la plej teda parto de tiu ĉi 40a... sed ĉiuj ja konsentas, ke perfekteco ne estas atingebla.

La venonta numero aperos fine de marto.

Intertempe, ĉiuj skrupuloplenaj geLAŬTuloj bv. esploru tiun ĉi februaran bultenon : se vi trovos en ĝi slipeton, povas temi pri instigilo reaboni. Krome, per tio la broŝurabonantaro ekscios pri la stato de sia broŝurkonto.

Amike al ĉiuj, Kribo.

PS. Kvankam mankas p.30 la rubriktitolo, ne hezitu aserti ĉie ĉirkaŭ vi, ke temas pri "La Kastelnova grupo". Hugh!

EŬROPO EN DANĜERO

Decido de NATO en Bruselo la 13an de decembro 1979 :
 En 1983 estos instalitaj 572 atomraketoj kun mezgranda flugdistanco (464 "cruse-missiles" kaj 108 "pershing II") sur la teritorioj de Belgio, Britio, Nederlando, Italio kaj Okcidenta Germanio.

Unu "pershing II" transportas 6 atomkapojn, el kiuj ĉiu estas tiel efika kiel la bombo, kiu detruis Hiroŝimon. Atingante altitudon de 240 km kaj rapidon de 20 000 km/h, ĝi povos trafi kiun ajn lokon en Sovetio ĝis Moskvo, maksimume 5 minutojn post la pafo.

La "cruse missiles" flugas malrapide (nur 2000 km/h) kaj tre malalte (30 + 60 m). Ili ne estas detekteblaj per radaro, kaj povas ŝanĝi sian trajektorion ĝis la lasta momento : tiel ili kreas necertecon kaj konfuzon ĉe la celata kontraŭulo.

Rebato de Sovetio al tia atako (aŭ antaŭmalhelpa atako de Sovetio por detruo la minacantajn instalaĵojn) havus kiel konsekvencon detruon de tuta Eŭropo, inkluzive Francion, Hispanion kaj Portugalion (per la "SS 20").

Nuklea milito limigita al Eŭropo estas inkluzivita en la kalkuloj de la usona geopolitiko.

Ni citu :

- Earl Ravenel, militista eks-ĉefo en Pentagono :
 "La intereso de tiuj novaj armiloj kun mezlonga flugdistanco konsistas ĉefe el ilia instalado en Eŭropo. Tiel ni minacas la koron de Sovetio, frapante en limigita maniero, kaj tiel ni oferas al la Sovetoj la eblecon limigi sian rebaton al Okcidenta Eŭropo." (1)
- Prof. George Rathjens (Teknologia Instituto de Massachussets):
 "Se mi startas detruan povon de 10 megatunoj, mi scias, ke tiel mi ludas pri la mondfino. Male, la nova misilo "pershing II" estas tiel preciza, kaj enhavas eksplodforton sufiĉe limigitan, por ke ni povu pensi ke, kvankam ni frapos la kontraŭulon, li ne reagos en tiel malespera maniero, ke li tuj rebate atakus la amerikan kontinenton.

(1) Laŭ Bittorf "Schuessplatz der Supermaechte" (Batalkampoj de la Superpotencoj). Der Spiegel, julio 1981.

Mi rajtas supozi, ke la kontraŭulo aŭ cedus, aŭ limigus sian rebaton al Okcidenta Eŭropo, aŭ eĉ nur al Germanio." (2)

Prezidento Reagan mem cinike avertis pri la ebleco de nuklea milito limigita al Eŭropo.

Dume li decidis, la 6an de aŭgusto 1981, fabrikigi kaj stokigi 1200 neŭtron-bombojn (tiuajn, kiuj mortigas homojn sen damaĝi la konstruaĵojn). La transportiloj por tiuj bomboj ("Lance"misiloj) estas jam surloke ĉe la eŭropaj bazoj de NATO kaj precipe en Germanio. Taktikaj armiloj por "proksima batalo", ili, kune kun "cruse missiles" kaj "pershing II", ebligas limigitan atommiliton.

Ĉu ni povas kredi, ke tiajn decidojn inspiras nur deziro pri paco ("Se vi volas pacon, preparu militon")? Kion diris generalo Alexander Haig, ŝtatestretario en Vaŝingtono? "Ekzistas aferoj pli gravaj ol paco".

Kiel ni vidas, la plej reakcia kliko de la usona kapitalismo ne kaŝas siajn intencojn. En Eŭropo tamen naskiĝis kaj ampleksiĝas reago de la publika opinio (kiu la oficiala propagando de la ŝtatoj prezentas kiel "danĝeran tenton pri pacismo-neŭtralismo"). Al la komplika konsento de la socialdemokrata kanceliero Schmidt (kun beno de la socialista prezidento Mitterrand) respondas pli kaj pli forta popola opozicio - ne nur inter ekologiistoj kaj ĉiamaj pacistoj kaj kontraŭmilitistoj, sed ankaŭ en la vicoj de la registaraj partioj. Pli ol 300 000 partoprenantoj en la manifestacio en Bonno, kaj freŝdata opini-sondado montras, ke nun la plimulto el la okcidentaj germanoj malaprobas la enkondukon de novaj eŭromisiloj.

Ĉu nur sentimentala reago sen serioza fundamento? Al la senkaŝaj deklaroj de usonaj respondeculoj, jam cititaj, mi aldonos nun citaĵojn de eŭropaj kompetentuloj.

- Pierre Sudreau, franca eks-ministro :
"Krima estas la nukle-milita strategio" (3)

(2) vd. (1)

(3) P.Sudreau : "La strategio de absurdo", 1980.

- Generalo de Bollardière :

"Suicida senelirejo" (4)

"Kompare kun la abomenoj de eĉ limigita atommilito, la koncentrejoj kaj la venengas-ĉambroj aspektas kiel et-industriaj procedoj". (5)

- Nederlanda generalo Meyenfeldt :

"La decido de NATO (decembro 1979) pliintensigi la akceladon de nuklea armilaro estas nur unu elemento en pli vasta tuto da aranĝoj, kiuj ĉiuj demonstras la intencon de Usono pri tiu ĉi nova pliampleksigado de la atomarmado. Ĉio celas doni la unuan baton, surprize ataki, ekskluzivante ĉian antaŭaverton, kaj tiel malpliigi la rebatpovon de la kontraŭulo" (6)

- Itala generalo Pasti, eks-vickomandanto de la NATO-armeoj kaj respondeculo pri la nukle-armila fako :

"La terura aspekto de la efektiviĝo de la usona militista politiko estas videbla en la klopodado por konvinki la amerikan publikopinion pri la ebleco konduki strategian militon ; por konvinki ĝin, ke tiu milito estas gajnebla, kaj ke la morto de 20 ĝis 30 milionoj da amerikanoj, krom milionoj kaj milionoj en aliaj landoj, estas tamen adekvata kaj akceptebla prezo por forigi unu fojon por ĉiam Sovetion kaj la tutmondan komunismon" (7)

- Franca admiralo Sanguinetti :

"Kiam oni bone rigardas la aferon fronte, objektive, malvarme, la granda politika, ideologia rivalo de Usono estas Sovetio. Bone. Sed ĝia granda ekonomia rivalo sur la tereno, kiu faras la potencon de Usono, estas okcidenta Eŭropo. La sola homara bloko, cetere pli multopa, kun brutta nacia produktaro supera al ĝia - kaj kiu estas plej grandskale la unua komerca potenco de la planedo - estas Okcidenta Eŭropo. Ĉesu vendi Mercedes-, Austin- aŭ Renault-aŭtomobilojn, kaj tiam ne ekzistos plu problemoj

(4) "Le Monde", 12an de aŭgusto 1981.

(5) Pierre Sudreau, vd. noto (3).

(6) "Generale fuer den Frieden" (Generaloj por paco). Koeln 1981. Sama estas la opinio de germana generalo Bastian.

(7) "Generale fuer den Frieden" (Vd. noto 6)

pri bankroto ĉe Chrysler. Oni do povas kompreni la revon de transatlantika Makiavelo : se oni povus, ne forlasante mem tro da plumoj, atingi tiun celon, ke sin interdetrui la politika kaj la ekonomia rivaloj, tio estus vere bela operacio." (8)

El parolado de germana advokato Klaŭs Croissant sur Larzako, 1981.

reproduktita en "Cahiers de la Réconciliation" n° 10 1981 (francilingva monata bulteno de la Internacia Movado por repacigado) resume tradukis Valo.

Komentoj -

1. En la ĉi-supra resumo mi parolis pri "komplica konsento de kanceliero Schmidt, kun beno de prezidento Mitterrand". Efektive, Schmidt en tiu afero kondukas kiel vasalo de Reagan, kaj Mitterrand aprobis lian sintenon. Tamen Mitterrand ne akceptus instaladon de eŭromisiloj en Francio ; sed li daŭrigas la nuklean armadon de Francio per propraj rimedoj (nukle-armitaj submarŝipoj kc.)
2. La cititaj faktoj evidencigas la cinikan makiavelismon de la usonaj registoj. Ni scias ankaŭ, ke la sovetaj, fidelaj al la instruado de Stalin kaj de Lenin mem, ne hezitas uzadi "ĉiarimedecon".

Do ne konvenus elekti inter ambaŭ militistaj potencoj, sed observi striktan neŭtralecon.

Ŝajne la germana popolo komencas kompreni tion, la franca ankoraŭ ne. La popoloj, kaj inter ili aparte la eŭropaj, devas ekkonscii pri la nuna tre danĝera situacio, kaj ne fidi siajn registojn, eĉ se tiuj ĉi estas demokrate elektitaj. La popoloj devas preni en manoj sian propran defendon, kaj trudi al siaj respektivaj registaroj celkonforman sintenadon. La registoj devas atenti sian publikan opinion, se ĝi sufiĉe laŭte sin esprimas. Eĉ en totalismaj reĝimoj : ekzemplaj estas la nunaj eventoj en Polio.

3. Kredeble ne ĉiuj legantoj samopinias kiel mi pri tiu temo : do ĝi povus esti temo por interdiskutado.

Valo.

(8) Antoine Sanguinetti : "Le devoir de parler" (La devo paroli), p.38.

En Nederlando : la "holandito"...

La laborista esperantoasocio F.L.E. en siaj organoj alvokis ĉiujn E-istojn partopreni la manifestacion de la 21a de nov.81 kontraŭ la starigo de novaj atomarmiloj en Eŭropo. Grupo de proks. 40 E-istoj kunmarŝis en la giganta homfluo tra la centro de Amsterdamo, ankaŭ kantante E-kantojn kaj disdonante la novajn faldfoliojn de FLE destinitajn al la pacmovado kaj atentigantaj pri la uzebleco de Esp-o. La etoso estis bonhumora, impona. Grandega sento de rezisto al la freneza atomarmado inundis la vicojn. Teatraj grupoj kaj muzikgrupoj prezentis aktualajn skeĉojn kaj muzikon laŭlonge de la tuta vojo. Ankaŭ ekster la grupo de 40 E-istoj estis E-parolantoj, kiuj manifestaciis. Komprenoble la giganta partopreno al la manifestacio estas forta bato al la dekstra por-atomarmila pregrupo en Nederlando. La kristandemokratoj, ŝanceliĝemaj kiel ĉiam, ne rajtis delegi reprezentanton-parolanton al la manifestacio, kiun organizis precipe la Intereklezia Konsiliĝo pri Paco (IKV) kaj aliaj porpacaj grupoj. Ili volis paroli en la manifestacio, sed ne subskribis la postulojn de la manifestacio. Tion rifuzis la aliaj partoprenantaj organizoj. Ni manifestacias kaj ne diskutas, estis la respondo al plendoj de la kristandemokratoj. Sed ankaŭ la reprezentantoj de la Partio de la Laboro kaj de la maldekstraj liberaluloj, D'66, kiuj nuntempe estas registaraj partioj, ne estis tiel varme akceptataj de la amaso sur Muzeo-placo. Ĉar tiuj partioj antaŭ nelonge en la parlamento deklaris, ke la NATO-duobla-decido el '79 estas fakto ne plu neebla. La fajfado al tiuj parolantoj en Amsterdam igis la reprezentanton de Partio de la Laboro diri, ke tiom longe kiom PvdA (socialdemokratoj) estas en la registaro, tiuj novaj atomraketoj ne estos starigataj sur nederlanda teritorio. Grava eldiro, kiun li poste ofte devis konfirmi.

(...) Ĉiukaze, la batalon ni en Nederlando daŭrigos, esperante ke la "holandito" infektos tutan Eŭropon. Por aliaj landoj la nederlanda ekzemplo de la pacmovado povas esti bone uzata. Plej grave estas, ke el eklezioj venu la iniciatoj.

(Ekstraktoj el raporto dissendita de F.L.E.)

En la venonta "Laŭte!" / M. Duc-Goninaz : "Kiel instrui lingvojn" - Cvi Lowenkopf : "Pri la kibuca movado" - kaj la kutimaj rubrikoj: debato (pri "Maljuneco kaj esperanto"), E-vivo kaj ĉies tribunoo...

Tutmonde dissendenda letero :

Jena letero estas ekkonsciigo kaj espero. Mi petas vin legi ĝin, ĉar ties temo estas gravega.

De la eventoj en Afganio la ĵurnalistaro multfoje aludis pri la risko de nuklea milito inter la Ŝtategoj. Tiu ĉi aspektas ne plu kiel neprobabla eventualaĵo, sed kiel risko, kiu havas multajn ŝancojn realiĝi en la venontaj jardekoj.

La internacia etoso estas malbona, la regantoj de l'Ŝtategoj ŝajnas frenezaj kaj oni tro malmulte denuncas la vetarmadon, kiu glutas monsumegojn, dum mizeras la tri kvaronoj de l' homaro.

Strategie, la nuklea defendo estas la plej granda stultaĵo imagebla, komparebla ja al la megalomanio de la regantoj kaj al la idioteco de l'militestroj. Efektive, tute ne ŝirmante la naciojn, kiuj ĝin posedas, la nuklea armilaro estas mortiga minaco por ili, ĉar okaze de ĝenerala milito ili estos la unuaj celitoj. Kaj kiel kredi la argumentojn de strategiistoj, kies planoj de ĉiam ofte estis mankoplenaj ?

Endas denunci poste la principon de defendo bazita sur la minaco de amasmurdado kontraŭ la civilularo. Tio ne indas je nacio sin nomanta civilizita, tio similas terorisman kaj kontraŭas al la militaj leĝoj kaj al la armea honoro ; tio estas abomena krimo same kiel la naziaj genocidoj. Kaj la landoj preparantaj tiajn buĉrimedojn falis al grado de barbareco neniam atingita en la tuta homara historio.

Urgas reagi antaŭ ol estos tro malfrue.

Kontraŭ tio, necesas potencega premrimedo adaptita al la drameca situacio. Junaj virinoj en landoj, kiuj preparas la nuklean genocidon, naskostriku ! Tio estas la nura efika rimedo por truddevigi iliajn megalomaniajn regantojn. Ĝi estas gravega decido konsekvenca kaj peza ofero, sed ankaŭ karitata ago, ĉar nia idaro ege riskas iam travivi la hororon de l'atoma homaferado.

Por la sukceso de tiu afero, faru plurajn dekojn da kopioj de tiu ĉi letero kaj sendu ilin senprokraste. Traduku ĝin, se vi tion kapablas, kaj sendu ĝin eksterlanden . Endas naski vastan internacian rifuzadon kontraŭ la nuklea armilaro.

Ne restu indiferentaj, ne forĵetu tiun tekston. Pensu, ke po 20 kopioj far ĉiu peranto, ĝi trafos 64 milionojn da personoj post nur 6 ĉeneroj kaj konsistigos gigantan referendumon. Tio ja indas etan fortostreĉon. Por ke vivu la mondo. En P A C O.

L U P A V I D P U N K T O

Pri la leĝo rilata al instruado de Esperanto, mi opinias, ke unue oni devus peti lokon en la Radio kaj en la Televido, ĉar, eĉ se oni havus sufiĉe da instruistoj, oni devas konfesi, ke nia duonjarcenta propagando ne sufiĉis por diskonigi nian movadon kaj naskigi ĝeneralan konsenton favoran al nia lingvo. Tiu akcepto far' de Radio kaj Televido estus grandega paŝo, se la publiko akceptos, ke Esperanto havu la saman lokon kiel ekzemple la rusa lingvo*. Do, antaŭ ol kalkuli la nombron da APK-posedantoj, oni devas klopodi por disponi la nuran rimedon, kiu ebligos diskonigi nian lingvon. Ĉar ĝis nun nia lingvo estas klublingvo uzata nur interne de kongresoj kaj kunvenoj (kaj ne ĉiam !).

Mi memoras pri diskurso de Franz Jonas, akceptanta la kongresanojn de IPEE, kiam li estis urbestro de WIEN antaŭ ol esti prezidanto de la Respubliko de Aŭstrio : "Nenion esperu de iu ajn Ŝtato, zorgu vian aferon mem". Iom same diris Tito prezidanto de la Federacia Respubliko de Jugoslavio : "Ne bonas, kio venas el supro, esperanto sukcesos nur se la popolo sentas neceson.". Do ni havas multajn jarojn antaŭ ni, kaj ICEM povas daŭrigi varbi, por ke la popolo sentu la neceson paroli esperanton.

Por Esperanto kiel por batalo kontraŭ atomenergio**, efektivego de la 35 horoj, k.a., oni ne devas multon esperi de tiu Ŝtato Socialista, kiu ne volas eliri el sistemo produkti por vendi... sed la abundanoj neniam disponis rimedojn por diskonigi la ekonomian sistemon de Jacques Duboin : produkti nur por necese konsumi... Tamen nur li pravas.

Mi konsterniĝas, ĉar de tempo al tempo aperas proponoj kontraŭ nia alfabeto. Zamenhof nenion inventis. Li nur adaptis

 (*)Mi rimarkas, ke la okcitanistoj kaj felibranoj okupas multajn paĝojn en la sindikataj bultenoj (SNI-PEGC); ne la esperantistoj... do ĝen bona komenco : havigu lokon en niaj korporaciaj gazetoj !

(**)Memoru, kiam Mitterrand diris, ke oni ne devas meti ĉiujn ovojn en la saman korbeton. Tio estis antaŭ la 10a de majo '81.

al okcidento la alfabeton de kroatoj, slovenoj, ĉekoj kaj slovakoj... Kompreneble oni bezonas pliajn literojn por skribi proprajn nomojn... sed demandu kiel la Ruĝoj skribas "Poincaré" ? Pli gravas, kiam Redaktestro de Bulteno kripligas vian artikolon : marbordo = bordo de maro, tagmanĝo = manĝo de la taga mezo, stacidomo = stacio-domo, skisemajno = skio-semajno... li diras : tio estas por konservi al Esperanto ĝian latinan vizaĝon ĉar laŭ tiu Redaktoro nia esperanto ne estas german-latinida lingvo, sed romida lingvo !
Bonan Tagon, Sinjoro !

LUPO

* *

Mi ne scias, ĉu ni estas pretaj, sed tion mi scias, ke ni estas naivaj kredi, ke niaj espero povas esti plenumitaj de ŝtato, kies interesoj estas kontraŭaj, ke ni povas fidi al antaŭbalotaj promesoj (la politikuloj promesas la lunon... kiam elektitaj nur montras la pugon), ke la tiel nomiĝintaj socialistoj kaj komunistoj povas alion fari ol administradi la kapitalisman sociordon je konto de privilegiuloj kontraŭ la interesoj de ĉiuj kaj ĉiu. Ĉu plifortigi la atomenergian programon, la konstruadon de armilaro, la influon de la armeo, la ŝalajran sklavecon, profitdonas al la laboristoj ?

La ŝtato favoras nur tion, kion ni elperfortas. Eĉ leĝo por Esperanto ne signifas, ke ni povos efektiviĝi ĝin. Ĉiel ajn ni devos kalkuli pri niaj solaj propraj fortoj kaj kontraŭ la ŝtata administracio ; tion atestis la luktoj por defendo de regionaj lingvoj.

Nenio, laŭ mi, ŝanĝiĝis pri la situacio de Esperanto en la franca socio de post la 10a de majo, de kiam sur la tronon de la defaligita reĝo instaligis napoleono kaj svarmo de parazitaj ratoj, kiuj jam konkuras je avido, orgojlo kaj ciniko kun la iamaj ĵiskarduloj kaj golistoj. De kiam la maldekstrularo iĝas dekstrema, taksante la maldekstrajn oponentojn teroristaj kaj senresponsaj aŭ tute simple dekstrema. Nenio ŝanĝiĝis krom jubilo de etnombraj esperantistoj.

Alia giganta naiveco konsistas el kredo, ke la junularo, kiu jam fajfas pri Esperanto kaj vomas la lernejon,

interesiĝos al tiu entrepreno, kiun ili ne estos iniciatintaj.

Do ni profitu ĉion, kio utilos al ni, sed tiu afero pri leĝpropono ja ne valoras malŝpari furzon.

Patriko.

Noto de la tajpinto : "ø" estas eltrovaĵo de la verkinto, kaj ni respektu lin.

* *

Morta estas, kio ne evoluas

(do mi kontribuas...)

Jam estas la propono pri "iĉo" kaj "ino" laŭ la modelo de "ĉjo" kaj "njo" : katoj - kato - katiĉo - katino

kamarado-kamaradoj-kamaradino-kamaradiĉo

(adiaŭ gekamaradoj...
sed kion signifas gekamarado ?)

sed eblas ankaŭ : virgulo - virguloj - virgino - virgiĉo

(For falokratismen...
kaj kune virgecon)

kaj la proponoj pri "stas" aŭ "as" anstataŭ "estas" kaj "del" anstataŭ "de l'" ktp...

Ankaŭ montriĝas la propono pri "w,x,q,y" anstataŭ "ŭ,ĉ,ŝ,ĝ".
(xu ni baldaw tuĝos perfektion ?)

Jen propono mia, kiu baziĝas sur konstato. Jam delonge ni malrespektis la fundamenton. Vidu mem : Maria ne rilatas al Mario, sed ja estas aŭtonoma knabino. Se mi konas Nixon, Nixo ne konas min...

Kiam ne malobei (mi estas aĉa malobeemulo) pri ĉiuj propraj nomoj ? Tiel ni kapablos solvi la "io-problemon".

Inter fundamenta, laŭregula, ortodoksa sufikso "ujo", kiu, kiam uzita pri lando, aspektas ridinde, krom en "Esperantujo" kompreneble, kaj neregula, pirata, anarkista, malobeema, neologisma, naturalista sufikso "io", kio cetere jam estas uzata en Esperanto por pluraj derivacioj, ni povas uzi jam internacian (preskaŭ en ĉiuj lingvoj) sufikson "ja" ? Ĉu Brazilo aŭ Brazilio ? Ĉu Brazilio ne estas la nomo de la ĉefurbo ? Laŭ mi en Brazilo (nomo de "pau brasil") loĝas brazilanoj same kiel en Kanado loĝas la kanadanoj kaj en Meksiko la meksikanoj. Sed francoj estas kies lando estas Francja

kaj germanoj kies lando nomiĝas Germanja, kaj hispanoj... Hispanja...

Kompreneble, la propraj nomoj ne bezonas plural-formon nek adjektivan (oni uzas "de") sed ili ja povas havi la akuzativan markon "n".

Patriĝ el Bretonja...

* *
*

Ĉ U N I E S T A S P R E T A J , A Ŭ N E ?

Leginte la debatartikolojn, mi estis invadita de tiu unua tuja demando : Kio estas la rolo de tiuj personoj scipovantaj E-on, kiuj ne estas laŭleĝe profesoroj kaj kiuj helpas la bonvolajn profesorojn lerni kaj perfektigi sian kapablecon en la esperanta lingvo ? Ĉu ni daŭrigu nian penigan laboron - kaj ne nur senpagan sed ankaŭ kostan - por lernigi tiujn profesorojn ? Kaj kiam ili estos pretaj, siavice ili laboros pagataj ; normale. Kaj ni, instruistoj de la profesoroj, kion ni faros ? Naivulo eble respondos, ke ni rekomencu kun aliaj profesoroj, aŭ daŭrigu niajn senpagajn kursojn. Mi konas iun, kiu, pro elspezoj pagataj per lia monujo por grava kurso, ĝin forlasis. Niaj valenciaj amikoj ne diros, ke mi troigas.

Pri tio parte jam respondas Nicole, aludante pri onta statuto por apliki la leĝon ; tiamaniere, ke la "herooj", kiuj ni estas, ne tro laciĝos. La respondecaj fakoj devas kompletigi kaj defendi tiun statuton.

Temas ankaŭ pri la historio de la kokino kaj la ovo : kiu estis la unua ? J.G. diras, ke nepra kondiĉo estas varbi profesorojn, kaj J. Paul diras, ke antaŭ ol varbi profesorojn ni devas vekti intereson en la publiko.

Pri tiuj koncizaj vortoj sperto, eble malgranda, montris, ke laŭ mi J.G. pravas pri la varbado de profesoroj. De tri jaroj mi gvidas kurson en la C.E.S. (dua-grada lernejo) de GUJAN-MESTRAS ; la fervoraj legantoj de "Laŭte!" tion ja scias, sed ne la novaj. Nu, la unuan jaron mi havis ŝancon bone kaj delonge koni la novan vicestron. Mi vidis lin kaj ĉar li jam aŭdis pri Esp-o, li promesis fari la necesan laboron por instigi la infanojn ĉeesti nian unuan kontakton. Nenece diri,

ke mi nenion povis fari, ĉar mi estis strangulo en la domo. Pro lia influo kvindek kvin gejunuloj alkuris. Certe pro la nefavora influo de pluraj gepatroj unuflanke, alia influo de aliaj geknaboj nefavoraj al la afero aliflanke, ni finis la jaron kun ok.

Ĉi-jare, pro mallonga foresto de la vicestro, nur tri novaj lernantoj aperis.

Ĉio ĉi tio evidentigas mian opinion, samkiel tiun de J.G. Mi ne neglektu la laboron farendan en la direkto de la publiko : sen lernantoj ni ne antaŭeniros multe.

La timo de esperantistoj pri tiu leĝpropono ne devus persisti. Certe ni renkontos malfacilaĵojn ; sed, ĉar nia manio estas la disvastigo de la lingvo, la eniro de E-o en la lernejojn faciligos nian taskon. La enhavo de la opinioj de la debatantoj konkordas ; diferencas nur la ordigo de nia agado. Ofte mi aŭdas la publikon diri, ke Esperanto devas esti instruata en la lernejo ; sen tio Esp-o ne progresos. Iom naiva, mi diras kiel la politikistoj antaŭ balotado : ke la simpla saĝo de la homamaso estas la bona. Unu fojo ne estas kutimo.

Esperanto en la lernejojn !

Petro.

* *
*

Pri manko de E-instruistoj post la "leĝo"

Estas sufiĉe da help-instruistoj, kiuj ĉiujare timas perdi sian laboron, por ke ili profitu la okazon ellerni E-on, ekzameniĝi.

Sed, kio pri la leĝo mem ?

P.Meunier-Guttin

* *
*

Pri supersignoj

Postmeti kromsignojn kiel proponite utilas nur por kelkaj komputiloj, estas malbela solvo tute ne efika por etikeditoj kaj literludoj. Nur la "tut-simpla" solvo uzi qwxy funkcias perfekte kaj bonaspekte. Komparu :

ĈIUJ ŜATAS ŜANGI LAŬ PLAĈO
CHIUJ SHATAS SHANGHI LAU PLACHO
C^IUJ S^ATAS S^ANG^I LAU^ PLAC^O
XIUJ QATAS QANYI LAU PLAXO

Kio estas pli facile kaj bele tajpebla, etikedebila, ludebla, legebla ?

Se vi iom hezitas, pensu, ke la "ĉ" fiksis sian ĉapelon surdorse, ke la "ŝ" ŝveligis rondeghe sian ĉapelon, ke la "ĝ" simpligiĝis kaj prenis nur duon-ĉapelon, ke la "ŭ" kunpremis ĉeflanke sian ĉapelon. Certe, iom da fantazio, sed utila kaj laŭ internaciaj normoj (la angla-usona normo estas kun H, malracie!).

P.Meunier-Guttin

* *

Malferma respondo

AL ANARKIIISTA KAMARADO

Responde vian lastan leteron, mi nur diros, ke dum mia soldatservo mia kapitano forigis min el la roto de la kaporallernantoj, ĉar, laŭ li, mi estis registrita per "ruĝa inko" kiel "pli ol anarkiisto". Tio tre mirigis min, ĉar mi opiniis min tre bona respublikano kaj aniĝis al nenia politika partio. De tiu epoko mia opinio pri antaŭleĝa egaleco en la franca respubliko tre modifiĝis.

Mi rakontas tion al vi, ĉar nun mi devas konfesi, ke mia kapitano tiam pravis : mi fakte estas "pli ol anarkiisto", mi estas socianisto, tio estas : individuisto konscia pri siaj devoj rilate la kolektivon, kaj kiu atendas, ke la kolektivo konsciui pri siaj devoj rilate la individuojn ĝin konsistigantajn. Kaj mi celas al socio daŭre memmastrumata de la popolo mem, kaj ne al senĉesaj detruoj kaj rekonstruoj de la kapitalista sociordo fare de anarkiismo helpe de aristokratismo, teokratismo, teknokratismo, demokratismo, liberalismo, socialismo, komunismo kaj individuismo, kiuj estas la farboj, per kiuj oni laŭvice ŝmiras la publikajn benkojn, malhelpante la publikon sidi sur ilin pro la ĉiam freŝa nova ŝmiraĵo.

Anarkiismo estas la ĉevalo, kiun rajdas la kapitalismo, aŭ morto, la kvara rajdanto de la Apokalipso, kiu jam de kvar jarmiloj detruas la Homaron per "la sovaĝaj bestoj de la Tero", tio estas : la aristokratoj, la

la teokratoj, la teknokratoj, la demokratoj kaj tiel plu... Kiam iu ne plu taŭgas por sia ofico, oni tuj anstataŭigas ĝin per la sekvanta, kaj tiel ĝis individuismo, kiu rekomencas alian ciklon.

Tiam agadon, kiun mi komprenis nur post tutviva memspertado, mi kompreneble tute malaprobas, kaj intencis ĉesigi ĝin alportante al la homoj la Veron, kun granda V. Sed montriĝis, ke la homoj preferas krei al si problemojn ol solvi kaj malaperigi ilin. Sen problemoj ili ne kapablu elporti sian vivon. Cetere, ĝisfunde esplorinte la aferon, oni tiam nur povas konstati, ke tiuj problemoj, tiel pri sociordo, kiel pri energio, estas memvole kaj intence kreitaj kaj organizate aplikataj de la Mondmastrantoj mem.

Konsekvence mi povas nur daŭre teni mian "klapon" fermita. La homoj mem daŭre elportu anarkiisman vivmanieron, se ĝi feliĉigas ilin, senutile suferigante kaj detruante ilin per melkado, tondado kaj buĉado. Por socianisto gravas nur resti en paco kun sia konscienco ; la medio nur akcesore gravas. Se li ne estus kapabla akomodigi kun ĝi, li ne estus naskiĝinta en ĝi.

Ja, nur plorinda estas la afero. Sed tia ĝi estas. Eblas helpi nur al tiuj, kiuj deziras helpon, ne al tiuj, kiuj ĝin rifuzas. Ĉiu helpu sin mem, sen kalkuli kun iluzia helpo de la kolektivo nuntempa, kiu zorgas nur plej perfekte "ŝvitigi la burnuson" per nova formo de koloniismo interne de la nacioj. Ĉiu serĉu kaj praktiku la Veron en si kaj por si mem, kaj la "intendantajo sekvos".

Kamaradece via,
B.G.D.

* *

Noto de la red. pri la "formulo" uzata en "Laŭte!"

Por novaj legantoj ni insiste atentigas, ke "Laŭte!" estas sencenzura. Ĉiu abonanto sin esprimu libere. Ĉar la abonantaro feliĉe konsistas el homoj kun plej diversaj vidpunktoj kaj ŝatokupoj, kaj ĉar ĉies vidpunktoj povas aperi en "Laŭte", rezultas daŭra "forumo" en kiu, kompreneble, ne mankas la kontraŭecoj. Ni opinias, ke ĉiu kontribuanto kapablas fiksi al si la "limojn" de tiu libero : ĝuste tiujn, kiujn li ŝatus, ke la ceteraj kontribuantoj ne transpasu. Ĝis nun, post kelkaj

La vino estas metita en la botelojn en F.

La vino estas enboteligita en F.

La vino estas botelita en F.

La unua sonas kaj aspektas plumpe, la tria ŝajnas tre eleganta, sed preskaŭ ne uzata. Kial? La signifo estas ĉiukaze klara. Same ni povus iom senbalastigi nian lingvon uzante ekz. "Fokusu vian atenton sur tion" anstataŭ "enfokusigu". Ankaŭ povus esti uzata simpla "ĉi" evite de "ĉi tiuj" ekz. "Ĉi aferoj min interesas".

La ĉiutaga uzado de Esperanto, nur tio, pliakrigas nian lingvosenton kaj -orelon, se tiel diri, por kompreni ĉiun nuancon kaj poluri nian esprimadon ĉu buŝan ĉu skriban.

S.P. Hurtt, Finnlando.

* *

La pola radio nun...

Pro la okazaĵoj en Pollando la fremdlingvaj elsendoj tute ĉesis kaj rekomenciĝis la 23an de decembro, sed nur en 4 lingvoj: la franca, la pola, la germana kaj la angla. Mankas pluraj lingvoj inter kiuj skandinavaj lingvoj, la hispana, la portugala kaj esperanto.

Estus bone amase skribi al Pola Radio (afable) por peti la restarigon de la E-elsendoj. Oni povas ekzemple diri, ke oni kutimas havi informojn pri Pollando pere de Esperanto kaj tre dezirus informiĝi en tiu lingvo pri la situacio en la lando kaj pri la E-movado. Preferinde eviti aludi pri la ĵusa puĉo. Alie riskas malaperi la plej ampleksa radio-programo en Esperanto, certe en la nunaj cirkonstancoj oni povas dubi pri la valoro de la politika parto, tamen multaj aliaj programeroj estas nur pri la E-movado kaj -kulturo kaj ĉiam estis tre interesaj kaj plie kontribuis al la kresko de la prestiĝo de esperanto ne nur en la okcidento sed ankaŭ en mondparto, kie la E-movado (kion ni tro ofte forgesas) prosperas.

Adreso: Radio Polonia, Esperanto-redakcio,

Varsovio 1, P.K. 46

PL 00 950 Pollando.

Robert.

* *

*

E-VIVO

Novaĵoj el Savojo

La 5an kaj 6an de decembro okazis en "Carrefour de l'Amitié" (loko de la SAT-Amikara kongreso) apud Annecy, staĝo organizita de Serge kaj Brigitte. Ĝi celis paroligi ĉiujn partoprenantojn kaj ĝi trafe sukcesis. La dudeko da partoprenantoj el Aix-les-Bains, Annecy kaj Chambéry foriris tre kontentaj kaj por iuj iomete lacaj. Gratulojn kaj dankon al ambaŭ geamikoj pro la ideo! Estas decidite, ke samaj staĝoj regule okazos, sed pro malfacilaĵoj organizi tranoktadon kaj la neebleco por iuj sin liberigi dum du sekvantaj tagoj, nur dimanĉe. La grupo de Aix-les-Bains trovos la lokon por la venonta staĝo (marte). Ĉiuj parolu sentime!

Ĉiusemajne kursoj okazas en Aix-les-Bains, Annecy kaj Chambéry en la lokaj MJC. En ĉiu urbo komencantoj regule lernas.

M.Haren.

Anonceto

E-grupeto (10 anoj 12-ĝis 40-jaraj) deziras korespondi, kolektive aŭ persone, kun tutmondo. Respondo garantiata. Kuraĝigu niajn komencantojn! MJC - Esperanto grupo, 2, rue Hoche, F 95120 ERMONT.

Semajno-fino en Barbière (Vaŭkluzo)

Kio okazis? Dek ok partoprenintoj sabaton. Dek ses dimanĉon. Funkciis tri laborgrupetoj: a) kun Andreo estis 4 komencantoj kaj du junulinoj, kiuj ĉeestis nur en la sabato. La tri unuaj lecionoj de la "Junul-Kurso" estis pri traktitaj en la tri laborkunvenoj. b) kun Antono estis la komencantoj de la pasinta semajnfino (marto 81): 6 partoprenantoj, kiuj studis unu lecionon kaj duonon de la "Junul-Kurso" (15a kaj 16a). La aŭdvida kurso de Sekelj havis grandan sukceson (du unuaj lecionoj). c) kun Roĝero laboris Jeannine kaj Suzanne. Ili studis tekstojn de Jean Ribillard, preparis la "vesperadon" kaj laboris pri la bildoj de la Sekelj-kurso. d) Helena demandis pri la bildoj de S., vizitis la tri grupetojn, kantigis ilin, pripensis la vesperadon, kiu okazis sabatvespere: kantoj, poemetoj, ludoj, spritaĵoj.

Kritiko : Tre interesa kaj fruktodona estis la debato, antaŭ la disiĝo. Komence, Roĝero starigis la demandon : "Kiamaniere oni devas agi por esti pli multnombraj ?". Andreo, tiuokaze, rimarkigas : "Bedaŭrinde, la lernantoj de Carpentras kaj Vaison ne profitis tiun okazon." Marcelle Domergue revenas al la ĵus travivita staĝo. Du interesaj rimarkojn ŝi faris : "Mi ŝatus, ke la disiĝo okazu iom pli frue sabatvespere. La paŭzo estis iom longa antaŭ la vespermanĝo hieraŭ." Tuj nova horaro estis unanime akceptita por eventuala alia semajnfino. Yolande opinias, ke detala informo pri la internacia lingvo, dum la monato, kiu antaŭas la staĝon, en la ĉiutaga gazetaro, devus efiki. Henri parolas pri eventuala propagando pere de libera radio-stacio.

Jeannine S. ĝojas : "Ĉiuj lernis ion." Henri proponas pli bone dispartigi la preparlaborojn. Magali aprobas. Henri daŭrigas : "La novuloj ne devas sin senti izolitaj. La "responsuloj" ne povas babilu kun ĉiu novulo samtempe dum la libera tempo ! Ĉiu partoprenanto devas atenti pri la amika etoso de la kunvivado. Ankaŭ laŭ la psikologia vidpunkto la staĝo estis sukceso : ni estas revigligitaj ! Unue dank'al intensa "tradicia" laboro (per la lernolibro) kaj ankaŭ dank'al la suplemento aŭdvida."

Andreo, antaŭ la disiĝo, alloge prezentas la Zamenhofan Tagon en Orgon...

Zamenhofa Tago en Orgon (13)

Pli ol 70 esperantistoj el 6 departementoj kunvenis en la mezgrada lernejo, kies estrino estas nia amikino Jeannine Scherrer. Bonegaj estis la verda aperitivo kaj la festeno. Bonega estis ankaŭ la Ĝigondasa vino ! En la mateno, Andreo Gentè tro longe prelegis pri ENGHOLM. Felice Leo Lentaigne revigligis la ĉeestantaron ! Post la manĝo :

- la Karpentrasa Grupo regalis nin per bildoj pri la "ĉaro" de MAZAN ; Gustavo Blary prezentis mirindajn diapozitivajn pri Egiptio ; Arlette Duc-Goninaz dancigis la ĉeestantaron.

Dum la tuta tago funkciis libroservo. Venontan jaron oni festos la Z-tagon en AIX EN PROVENCE, kaj verŝajne en NIMES la sekvantan.

Teksto koncernanta la enkondukon de Esperanto en la lernejojn estis voĉdonita :

"La esperantistoj kunvenintaj en ORGON (Provenco) la 13an de decembro 1981, opinias ke :

- la esperantistoj en Francio devas postuli de la nunaj registaro kaj parlamenta plimulto la plenumon de la promesoj, faritaj antaŭ la majaj kaj juniaj balotoj, pri la enkonduko de Esperanto en la lernejajn programojn kaj ekzamenojn ;
- la agado por atingi tiun celon koncernas ĉiujn esperantistojn kaj devas disvolviĝi en plena klareco. Por tio necesas krei adekvatan organismon, reprezentantan ĉiujn organizaĵojn kaj personojn, kiuj ĝis nun zorgadis pri la instruado de la lingvo."

E-vivo en MARCENAI (Ĝirondio)

Marcenais, eta vilaĝo en norda Ĝirondio, akceptis, la 21an de novembro, posttagmeze, la novembran kunvenon de nia Grupo. En la festosalono la surloka E-viro starigis E-ekspozicion. La lokaj gazetoj aperigis la informon : "Exposition Espéranto". La ekspozicion vizitis 26 plenkreskuloj kaj pluraj infanoj. 13 gesperantistoj ĉeestis. La debato, pri la celoj de nia lingvo, estis vigla kaj riĉa. La demandoj ŝprucis. Du familioj aĉetis lernolibron. Ĉu baldaŭ E-grupeto en Marcenais ? Kial ne? Respondo la estonto ; sed hodiaŭ tiu E-posttagmezo ĝojigis nin!

Joël.

En DORDONJIO (?)

En CUBJAC (Dordonja departemento) nia samideano Mauranges aktivas por konatigi esperanton en tiu malgranda vilaĝo. Artikolo pri esperanto en la gazeto de loka kultura asocio kaj ekspozicio pri Nederlando estas antaŭvidataj. Aliparte, sekve de la renkontiĝo en Sireuil (Virinoj kontraŭ la Milito) la loka gazeto "Le Temps du Périgord" oferis sian unuan paĝon de la januara n-ro al la diversaj organizoj por prezenti iliajn vidpunktojn rilate al la temo "Paco 1982". K-do J.G. sendis komunikaĵon pri Esperanto kun adreso, al kiu sin turni. La senpaga gazeto "24.Presse Service" disdonata en ĉiuj letterskatoloj akceptis anoncon pri Esperanto. Ĝi aperis en la lasta n-ro. Ni esperas, ke tiuj diversaj propagandaj veki la interesigon de la Perigordanoj pri Esperanto !

J.G.

* *
* *

Je la fino de la kongreso, unufoje en la historio de la italaj kongresoj, 150 kongresanoj (inter kiuj ĉiuj eksterlandanoj: 20 el entute 312 partoprenintoj) partoprenis en surstrataj manifestacioj, kiuj disvolviĝis antaŭ la sidejo de la nacia televido (RAI), de la itala oficejo de la Eŭropa Parlamento, kaj de la naciaj ĵurnaloj "Paese Sera" kaj "Il Messagero". Pluraj gazetoj raportis pri la manifestacioj.

Laŭ mia opinio la nombro de la partoprenintoj estus estinta pli granda, se tiu manifestacio estus okazinta en la unuaj kongrestagoj anstataŭ ĉe la fino, kiam multaj kongresanoj jam sin preparis por la hejmenreveno. Kvankam la manifestacioj tamen faris sufiĉe gravan impreson ĉe la informservoj, pli granda nombro estus havinta pli trafan efikon. Malgraŭ tio, la organizantoj meritas nian gratulon. (...)

Surstrata tramarsĉo de sufiĉe multnombraj manifestaciintoj estas evento pri kiu radio, televido kaj gazetarservoj ne povas silenti. Plie, tiele nia movado ĝuas senpagan trafan reklamon.

Alia sugesto de ni farita tuŝas uzon de ununura, inter ĝesp-istoj konantaj aŭ nekonantaj unuj la aliajn, alparolo kaj alskribo, ricevis bonvenon ankaŭ de la estraro de UEA. Fakte, en siaj paroladoj en Varno UEA-prezidanto Tonkin uzadis la vorton "gekolegoj" anstataŭ "gesamideanoj", "ĝesinjoroj" aŭ "gekamaradoj". "Gekolegoj" estas taŭga vorto, ĉar ni ĉiuj havas samajn celon kaj taskon, kvazaŭ kunlaborantoj en labor-kaj oficejoj. Forĵetante ĉian diskriminacion inter homoj de malsamaj opinioj, intereso, situacioj, rasoj kaj seksoj per tia konkero sur la kultura kampo, la esperantistaro certigas pli firman unuecon, forigante diferencojn inter si, rutinajn kutimojn grave malhelpantajn evoluon al pli taŭgaj moroj. (...)

Resume, mi atentigas ke per konstantaj streboj kaj streĉa kunlaborado ni povas atingi sukcesojn ne nur je la profito de nia movado; ankaŭ je tiu de kulturo tutmonda, ĝenerale, ĝis la atingo de la plej alta stadio. Mi opinias, ke ni iĝis esperantistoj ne nur por Esperanto. Do, ni uzu ĝin por antaŭenigi la kulturajn valorojn de la mondo. Esperanto havu la honoron kaj meriton servi por tiu celo.

(teksto iom resumita de la red.)

G. Dumont.

JUS APERIS

VALO : Migrado tra metioj

La unua paĝo sciigas nin, ke la verko ne temas nur pri profesioj sed ankaŭ pri spertoj, eventoj. "La laboro ne konsistigas la tutan vivon."

Estas tre interesaj paĝoj pri la diversaj laboroj, kiuj haose sin sekvis laŭ la premo de la eventoj, de la hazardo kaj ankaŭ de la "fantazieco". Spite oftajn kaj ne atenditajn okazaĵojn, foje la malfacilaĵojn por adaptiĝi, tiu migrado tra metioj havas tute alian karakteron ol la hodiaŭa "ĝisnunigo". Trovi laboron estis, ŝajne, pli facile ol nuntempe, precipe, kiam temis pri "gadzarto" (la "gadzarta" solidareco ne estas vana vorto), inĝeniero, dum multaj el la hodiaŭaj senlaboruloj estas

**MIGRANTE
TRA METIOJ**

ne kvalifikuloj.

Sed multe pli interesaj, historie kaj home, estas la ĉirkaŭantaj okazaĵoj: la rilatoj kun Germanoj, la vivo en Parizo, la junaj jaroj de la kin-arto, la sonfilma revolucio, la kabaredoj, sed ankaŭ la ekzekuto de Sacco-Vanzetti, la kontaktoj kun la tiutempaj famaj politikuloj, anarkistoj, kontraŭmilitistoj, sindikatistoj, verkistoj, diversdoktrinaj intelektuloj, aviadistoj... ne nur francaj sed eksterlandaj. Se la pensoj disflugas tra la mondo ankaŭ la eventoj en nacio pli-malpli rapide efikas kontraŭ la aliaj nacioj; la internaciaj rilatoj fariĝas pli kaj pli oftaj kaj necesaj. Tial la fino de la verko esprimas la elkoran deziron pri kreskado de la disvastigo de komuna interkomunikilo: Esperanto.

Daŭre bonege eldonita de Broŝurservo de SAT, Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut. (111 paĝoj, 10 FF)

G. Roux.

ARGENTINA NOVELARO

23

(TRIA SERIO)

Recenzo estas timiga afero. Tamen mi akceptis la "oferon" malicete proponitan de nia amiko Prezidanto-Presisto*. Sed agrabla surprizo atendis min. Juĝu mem !

Kio tiel revoluciigas la oficejon de vilaĝa mekanikisto ? Simpla, kompatinda rato, kiu tamen sukcesas eskapi la popolan venĝemon dank'al senintenca helpo de ordonema mastro. El tiu humurplena okazaĵo ĉiu povos tiri pli ol unu instruon.

Ĉu ĉevalo parolkapablas ? Jes, asertas tiu aŭtoro, kiu spertis "senmortan timon". Veras, ke li iom ebriis. Tamen en tiu mirakla nokto argentina, kiu povas scii ? Des pli, ke "Guanako", la bistrulo, elvokas ehojn el fora pasinteco.

En la insulo oni ekscias plian fojon la sorton faritan al la lepruloj. Tragika atmosfero momente mildigita de saĝa infano kaj donema naturo. Oni povas prijuĝi socion laŭ ties sinteno al la "lepruloj", kiujn ĝi estigas.

Kun "La Sudo" estas "Sango kaj lumo", ĉiamaj temoj de sunplenaĵoj landoj ĉefe hispanaj. Fiero kaj kuraĝo de homo, kiu mortos por defendi sian honoron. Rasa kaj klasa malamo.

En "La nigra kruco" plu temas pri kuraĝo, senespera kolero ne kontraŭ la Destino aŭ Dio, sed kontraŭ mizero, maljusteco kaj ties gardantoj.

"La Mortinto" rakontas pri alia mallonga kaj tragika destino. Ne plu kulpas la fatalo, aŭ pli ĝuste provokas ĝin hasto de juna ambiciulo sen virto.

Konklude,

al kiu deziras malkovri Argentinon kaj l'animon de ĝia popolo, mi konsilas legadon de tiu tria serio (kaj de la du antaŭaj) de "Argentina Novelaro". La stilo klara, la tono vigla de ĉiu novelo estas tiel elvokivaj kiel tuta libro. Por inflacia prezo de 15 FF mi promesas al vi riĉigajn vintro-vesperojn kaj tri bonajn verkojn pliajn en via biblioteko.

J.C.Gionco

*(red): kion oni eltemu de amikoj !!!

P.S. Tiu ĵus recenzita "3a serio" kostas mem 5 FF.

Sub la titolo "Enkonduko en la kulturon" Portugala Eldona Rondo (Rua Anselmo Braancamp, 259 - 4000 PORTO, Portugalio), envojigis serion de broŝuroj. La du unuaj aperis en 1981 :

* Vivo de Edison, de Prof. Agostinho da Silva, trad. de J. de Freitas Martins. 16 paĝoj en A5-formato, havebla kontraŭ 2 irpk. al Portugala Eldona Rondo.

* Granda Instruisto de la Nacioj : la vivo kaj laboro de Jan Amos Komensky - originalo de H.K. Bouška. 48 paĝoj A5, havebla kontraŭ 4 irpk. al Portugala Eldona Rondo.

Sub la gvidado de Manuel de Freitas, tiu eldon-rondo - simile al SAT-Broŝurservo - ne disponas pri plej multekostaj eldonrimedoj. La kajeroj estas ofsetitaj kun pluraj ilustraĵoj kaj mane kudritaj. La skribmaŝino estas eluzita kaj la korektitaj tajperaroj iom malbeligas la paĝojn.

... Sed eklegante la bonstile verkitajn tekstojn, oni rapide forgesas la presartajn mankojn. Edison kaj Komensky estas tiel famaj, ke ne necesas insisti, des malpli pri Komensky, kies nomon ne forgesas menci ĉiuj minimume kleraj esperantistoj, kiam ili volas montri, ke jam de jarcentoj "fantomis" la ideo de internacia lingvo.

Tria broŝuro ("Vivo de Alexandre Herculano" de Prof. Agostinho da Silva) estas anoncita (2 irpk). Oni povas mendi la tri samtempe (8 irpk). Tio kuraĝigos la fervoran eldonrondon, kiu ĵus remalfermis la vojon al E-eldonado en lando, kie dum jardekoj ĝi estis kvazaŭ nula.

Longan vivon al Portugala Eldona Rondo !

Kribo.

* *
*

Solidareco Internacia Antifaŝista

Por 1982 la temo de la kalendaro de S.I.A. estas Francisko FERRER kaj la Racia Lernejo. La tekston verkis la universitata ano Gérard Jacas. La resumo, verkita de F. Montseny, estas tradukita en esperanto, kiel kutime.

Prezo: 45 FF por ĉiu ekzemplero. Adresu la mendojn al :
S.I.A., 4 rue de Belfort, F 31000 TOULOUSE.

* *
*

Malfacilas fari pli...

1. Eldonado : En 1981 aperis aŭ reaperis 16 titoloj. Malfacilas fari pli... Estis reeldonitaj (konsultu vian kodaron!) AP, DI, DU, EA, EH, KK, LA kaj VL1. La novaĵoj estis : AR3, GE, IS (du volumoj), MM, NE, NI, VL2 kaj laste "Imaga Dialogo Marks/Bakunin" de Maurice Cranston (trad. D.C.) 32-paĝa (kodo MB), pri kiu vi povos legi recenzon en "Laŭte" (4 FF).

2. Novaj eldonoj : Ĝus aperis, en januaro, la 110a eldonaĵo : "Historio de SAT - 1953-1981" (36 paĝoj, 4 FF), priskribo de la multe pli kvieta (ĉu ne tro ?) dua vivperiodo de "Sennacieca Asocio Tutmonda". Poste, la broŝureldonado paŭzos proksimume unu jaron, lasante iom da tempo por la reduktado de nun alarme impona stoko.

3. Nova, ĝisdatigita detala katalogo estas disponebla (20 p.). Spite la inflacion, la prezoj restas samaj. Tamen, pro la plialtiĝo de la sendkostoj estas fiksita je 60 FF la minimumo, por ke mendantoj ne pagu la afrankon. Aliflanke, ĉiuj libroservoj (asociaj aŭ grupaj) ĝuas 20 % da rabato - kaj kompreneble ne pagas la afrankon - por mendoj superaj al 60 FF. Malfacilas redukti pli...

4. Abonantaro : Ve, la abonantaro regresis al 64, kio certe ne estas sufiĉa por garantii minimuman eldonkvanton. Feliĉe, se ne montriĝis novaj "klientoj", tamen ne mankis la apartaj mendoj de la fidelaj. La speciala oferto finjara ("Laŭte" + broŝura serio 1982, kontraŭ 60 FF) ĝis nun ne havis fortan eĥon, sed por 1982 jam estas registritaj 64 broŝurabonoj, kio esperigas almenaŭ provizoran plibonigon de la situacio.

5. Kasbilanco

(en FF)	Vendoj-Provizoj 15765,03	Eldonado 15802,45
	Donacoj 3556,30	Afrankoj 3659,50
	Antaŭa saldo 11089,51	Transĝiroj 1069,46
		Stencil-gravurilo 6000.
		<u>Nova saldo 3879,43</u>
(fino sur la lasta paĝo!)	30410,84	30410,84

PRI ENERĜIO *****

Estas stultaĵo luktadi nur kontraŭ atom-energio sen proponi eblan solvon al manko de energio, ĉar :

- energio estas neceso por liberigi la homojn de tedaj laboroj kaj efektivigi multajn homajn celojn, unue la nutradon de ĉiam kreskanta homaro.
- petrolo ne estas pli paca ol atomo, ĝi estas la ĉefa neces- aĵo de armeoj kaj la profito de ĝia vendado estas uzata por aĉeto de armiloj.
- la energioj de la suno kaj la vento rezultas dekoble pli kostaj ol la atoma.
- nur la energio de la maro estas disponebla por akceptebla prezo.

Do, por utile agadi, konvenas peti la konstruon de mar-energiejoj, ekzemple tiu de la Kaleza-Dovra markolo, kiu produktus pli ol dek atomejoj, ebligus la transiron de aŭto- kaj fervojoj kaj kies kluzegoj gajnus profiton pli grande ol la Suez-kanalo !

P. Meunier-Guttin.

ĈU PLU MANIFESTACII ? *****

Felikso : Post la abrupta, sed ja antaŭvidebla, decido de la franca ĉefministro finkonstruigi atomcentralojn en la lokoj, kie oficiale devis "stagni" la konstruado, kelkaj obstinaj ekologiistoj plu manifestacias...

Jako : Stulte ! Senutile ! Mi iam estis fervora kontestanto, sed nun la regpovo decidis, restas neniu venkebleco.

F. : - Ĝuste tial, ĉar la registaro kalkulas pri la malmobiliz-ado de la kontraŭularo, ni, persiste konsciaj pri la danĝeroj, kiujn ni denuncas jam de dek jaroj, devas obstine montri nian neŝanceleblan kontraŭstaron ! Oni ankoraŭ ne tranĉis al ni la langon, oni ne kripligis nin. Ni povas plu manifesti nian konvinkon lange, krure kaj brake, laŭ la individuoj. Se, kiam ĝia celo estas prava, la konscia parto de la popolo rezignas, pri kiu kalkuli do ? Ĉu atendi "vekiĝon" de la plimulto, kiam la konscia malplimulto preferas dormemi ?

J.: - Sed ni povas fari nenion, krom bleki kaj fuĝi, superŝutate per larmigaj grenadoj !

F.: - Kio farebla, tion faru ni, ĉiu laŭ propra emo kaj kapablo. Kiuj volas provi detrui materialon, tiuj faru. Ni ne kondamnu ilin. Kiuj preferas montri sian "potencon", marŝante milope (centope...) sur ĉefvojoj semajnfine kaj poste priplorante la silentadon de la radio- kaj televido-elsendoj, tiuj "defilu" neperforte. Marŝado estas saniga ekzerco. Kiuj kredas, ke la ekologiistoj preferinde "revengŭ" okaze de venontaj balotadoj, tiuj preparu la "revengon", sed ĉu vere restas iluzioj sur tiu ĉi kampo ? Ni uzu ja ĉiujn rimedojn, escepte de hommortigo, kompreneble. Materialajn detruojn mi ne konsideras perfortagoj. Almenaŭ ne pli ol la detruon de la naturo, kie oni preparas buldoze la "sidejojn" de la estontaj atomcentraloj.

Malpli grave, sed iel same signifoplene : ĉu la franca esperantistaro rezignu sian celon, se Mitterrand forgesos sian antaŭbalotan promeson diskutigi leĝproponon favoran al Esperanto ?

La homa naiveco egalvaloras ĝian stultecon. Ĉiu generacio spertis, eĉ plurfoje, la "perfidon" de politikaj partioj kaj ĉiuspecaj savontoj. La socialdemokrataj partioj ne estas esceptoj. Memoru pri 1914, pri la alĝeria milito, pri majo 1968, pri...

J.: - Nu, kion konkludi ?

F.: - Bof ! Ĉiam seniluzie, sed neŝanceliĝante, kaj des pli firme, ju pli fora la sukceso...

J.: - Paĉjo, ci tute frenezas ! Kaj kiam do ĝui la vivon ?

F.: - Ho, hedonisto, ci ja scias, ke ĝuste ĉe ni, naturamantoj, troviĝas la plej vivfrandemaj, kaj ĝuste por tiu rajto vivfrandi ni baraktas...

Kribo.

LA MOLA BATALILO

"...Ie en Laŭte mi legis sopirĝemon kiam policanoj uzis gason. Kial ni ne ĵetu per niaj propraj fekaĵoj ? Leginte tion, mi pensis skribi ion pri tio..."

Jen la kontribuo de nia leganto :

LA MOLA BATALILO

Moto : Deponu vian fekaĵon lastan,
zorgeme en saketon plastan.

Kiam la M.E.* iam denove hakos,
dum kontraŭuloj nuklefendadon atakos ;
prenu saketon kun via fekaĵo
kaj lerte ĝin svingu en policanvizagŭon.
Estas tre mola altuŝo,
precipe en aĉa buŝo.

M.E. ja estas aro da nuloj,
kaj de la ŝtato fidelaj servuloj ;
montriĝas, kiel obeemaj bravuloj
ĉiam batantaj por la "havuloj".
El la socio ili estas vomajo,
ilia ekzisto granda domaĝo.

Eklezion ili vizitas
kaj karitaton ili imitas.
Indiferentaj pri atomradiadoj
kaj malpurigadoj ĥemiaj.
Nur disrompante rezistbarikadojn.
Bravuloj pensante neniam.
La atomrubaĵoj aŭ pleje - la bombo ?
Detruante la tuton en komuna tombo ?
Provokantoj ili ofte ja estas,
obeemuloj ĉiuj ja restas.
Dunguloj de "patro la ŝtato",
ili nur paroladas per bato.
Hodiaŭ kaj dum ĉiu sezono,
obeemaj al ĉiu ordono.

TAMEN NI NE ESTAS SENPOVAJ.

Ni serĉu rimedojn plinovajn
Novajn rimedojn ni certe ja trovos
Kaj ankaŭ apliku ! En arsenalon enŝovos !
Estu iafoje la urso,
al ili flarigu la furzon.
Ni trovis la jam nomitan uzilon,
vi eble konstatos utilon.
Kiam vi tiel laboros
via abomeno tiele odoros !

25-11-'81
Vespido.

*M.E. = movebla unuaĵo

(Poemo ekologie politika aŭ politike ekologia)

Pagu : redonu la koloron, kiun vi ŝtelis.

Pagu ruĝe : Redonu la ruĝan koloron, kiun vi ŝtelis per viaj mensogaj flagoj kaj viaj ŝildoj pri Coca-Cola. Redonu la ruĝan koloron al la penis, al la sango kaj al la suno.

Pagu blue : Redonu la bluan koloron, kiun vi ŝtelis por viaj policistaj uniformoj. Redonu tiun blu-koloron al la maro, al la ĉielo kaj al la okuloj de la tero.

Pagu verde : Redonu la verdan koloron, kiun vi ŝtelis per via mono. Redonu tiun verd-koloron al la floroj, al la ĝangalo, al la rivero kaj al la ĉielo.

Konsilantaroj, sindikatoj kaj registaroj el la tuta tero, redonu la kolorojn, kiujn vi ŝtelis !

William Burroughs, poeto el la usona
"Beat-generacio".

-mn- rakontas : Ekzistas fiŝoj, kiuj sentas la proksimecon de la fino de sia vivo (per nekonata kialo) kaj tiam reiras al la fonto de la rivero, kie ili vivas.

Tio ne estas ebla, ĉar homoj konstruis baraĵon por produkti elektran kurenton necesan por la nuna homaro.

Mi ne renkontis ekologiiston ("amiko de la naturo"), kiu helpis fiŝojn, rekte aŭ nerekte, plenumi tiun naturan devon. Tiu malfacileco certe transformos, en eteta parto, la konsiston de la rivera naturo. Mi ne renkontis ekologiiston, kiu decidis loĝi en arbo - aŭ truo de roko - kiel siaj prapatroj kaj petis per preĝo al Dio, se li suferas hemikranion aŭ dentdoloron.

Konsekvence, mi opinias, ke ili agas plej bone, revidante la utiligon de siaj libertempoj.

Mi pensas, ke ili preferas loĝi en agrablaj domoj kun centra hejtado, telefono, televido kaj eventuale lifto kaj utiligi alumeton por ekbruligo de gaso, kiam venis horo por fari varman manĝaĵon...

-mn-

Nova leganto, freŝbakita esperantisto skribis :

"La revuo multe plaĉas al mi. Ĉu estas eble dediĉi pli grandan lokon por la leteroj de la legantoj ?..."

"Kun Ginette kaj Nicole mi opinias, ke en porpacaj renkontiĝoj sur la altebenaĵo de la Larzako, la Esperantistoj estis tro diskretaj. Tamen, ĉiuj bedaŭris la foreston de komuna lingvo kiel ESPERANTO..."

"Mi permesas al mi sendi al vi mallongan poemon skribitan de amikino. Mi ŝatus, ke la legantoj kaj legantinoj diru sian opinion pri tiuj pacaj vortoj. Antaŭdankon..."

J.L.Dugas.

DUDEK JAROJ

Li aĝis nur dudek,
Oni al li enmanigis fusilon,
Li deziregis nur amon,
Nur poezion kaj ridetojn.
Oni al li enmanigis fusilon.
Li aĝis nur dudek.



Li aĝis nur dudek,
Al li oni diris : "Takte marŝu!"
Tiam li marŝis,
Kun piedoj sur la grundo,
Kapo en lazura ĉielo.
Al li oni diris : "Takte marŝu!"
Li aĝis nur dudek.

Li aĝis nur dudek,
Al li oni diris : "Mortu!"
Li deziregis nur amon,
Nur poezion kaj ridetojn.
Al li oni diris : "Mortu!"
Li aĝis nur dudek.

KATERINA VIAVANT

(1979.12.08)

Traduko de Johano-Luko DUGAS.



NIA FELIETONO

TRA LA MONDO
per biciklo kaj esperanto

La 17an de septembro 1930

Mi estas senintenca partoprenanto en bicikla kur-konkurso TOKIO-OSAKA. Sur multaj arboj verdaj papilioj kun sago montras la direkton. La policanaro lasas min veturi kaj mi "venke" atingas la cellinion sub aklamoj. Tiukaze mi vendis kaj donis - pliofte - 600 kartojn proksimume !

La postan tagon S-ro AKUAKU vizitigas al mi kinostudion. Mi ĉeestas filmadon. Mi konstatas, ke la profesio ne estas senzorga.

Por fini la verperkunvenon ni iras en kinejon. Nova surprizo : eĉ ne unu sidilo en la ejo. La planko estas dekliva kaj matkovrita. La spektantoj, inkluzive de mi, devas sidi sur la kalkanoj kaj kompreneble eniri sen ŝuoj ; sekve, estas speciala antaŭĉambro por ilin demeti. La miraklo estas, ke ĉiu retrovas siajn ŝuojn sen incidento. La filmo estas senparola. Tamen, malgraŭ ia nekompreneo pro la kulturdiferenco, mi rimarkas, ke la japano havas saman guston kiel la franco. Tamen, laŭ socia vidpunkto ni tre malproksimas de la sovetaĵ filmoj.

La kvarlatero TOKIO-KIOTO-OSAKA-KOBE

Mi havas la impreson, ke tie oni koncentris kaj sintezis la tutan modernan vivon. Unue estas la riveroj, kiujn oni finas digi kaj taŭgaranĝi. Poste estas la vojo ĉiam en refaro kaj modernigo. En 1930 certe ĝi estas unu el la plej uzataj pecoj el la tuta mondo, tiom densa estas la trafiko. Estas ankaŭ kvarvoja elektrizita fervojo, sur kiu veturas trajnoj komfortaj kaj tre rapidaj. La ebenaĵo estas juvelo el rizejoj kaj verdantaj legomejoj. Uzante la plej malgrandajn reliefojn, ili sterniĝas en ŝtuparoj zorge irigaciataj.

Tiel mi alvenas en OSAKA ĉirkaŭ la 13a. Jam de 15-20 kilometroj la antaŭurbo estas fabrike superplena. La laboristaj suburboj estas karakterizaj. La trafiko estas tiom densa, ke mirakle mi evitis plurajn akcidentojn. Oni povas diri, ke OSAKA-KOBE-TOKIO formas nur unu grandegan urbon vertiĝodonan.

Vespere, S-ino AKUMURA, edzino de imperiestra kortegano



kaj tre bona esperantistino, min atendis kun multaj amikinoj : la renomo al mi farita fruktodonis. La kunveno okazis meze de la afektaĵoj de tiuj sinjorinoj. Kompreneble, oni kantigis min en Esperanto kaj en la franca. Lastminute, alvenis eminenta gasto. Tiam la ĉeestantaro ekkantis japanan patriotan himnon. Miaflanke mi kantis la "Marseljezon". La ĉeestantaro entuziasme manklakis, salutante en mi la francan prestiĝon.

Ni enlitiĝis je noktomezo. Tamen je la sesa ni ĉiuj staris. Eĉ en la monhavaj socitavoloj oni ne pigras. Je la ellitiĝo, marbano, tiom bela kaj milda estas la vetero ; sur la sama paralela cirklo en ĈITA, 200 km okcidenten, jam frostas.

La 9an de oktobro 1930.

Mi forlasas KOBE al HIMEZI kun 10-12-jara knabo, varme adiaŭate de kamaradoj N. kaj T. Mi veturas sur marborda kornico. Bona vojo, pejzaĝo bela. En OKABRU mi retrovas la spektaklon de la tradicia Japanio. Mi alvenas dum religia procesio. Sur estrado portata de trideko da viroj staras skizo de buddista templo. (Similan procesion mi vidis en Moskvo, kie la maŭzoleo de Lenin anstataŭis la templon). Sekvas multego, precipe gejunuloj kaj infanoj, kiuj krias, tumultas, dancas en kvazaŭa kolektiva deliro, akompanate de surdiga muziko. Estas vera foiro, kie preĝovendistoj miksiĝas kun bazaruloj.

Sinjoro ISAO FUJTAMI, 25-jara bonzo kaj esperantisto, deklamas al mi : "La popola gento pli kaj pli seninteresiĝas pri la religio. Mi mem ne estas tre konvinkita de la nunaj religiaj metodoj. Mi ne ŝatas mian funkcion sed ĝi estas necesa por mia vivtenado. Mi estas logata de la veturigista profesio, kaj intencas enlokiĝi en TOKIO tiucele." En lia biblioteko mi rimarkas verkojn de MARKS, LENIN kaj ENGELS. Li konfesas, ke li pli inklinas al la "novaj" ideoj ol al la religio. Tiel, precipe ĉe la studenta junularo, mi rimarkas ne malmulte da kritikemuloj, skandale montrantaj "komunistajn" ideojn. Sed ĉi tie temas pli ĝuste pri socia progreso ol revolucio.

OKOJAMA, la 11an de oktobro 1930.

La domo de Sinjoro N. en la antaŭurbo mezmontete superstaras la urbon. De tie oni vidas fumnebulon ĉiam ŝvebantante en la valo. Vespere, komuna manĝado en familia etoso, ĉirkaŭ 15-kilograma fiŝo, en vasta plado, el kie ĉiuj ĉerpis per bastonetoj, gesto simila al kamparanaĵo rusaj. Ĉi tie la bankedoj pli simplas ol en Sovetio aŭ Francio : neniu alkoholaĵo kaj manĝado konsistanta ĉefe el fiŝaĵo.

HIROŜIMA, la 13an de oktobro

La loko estas admirinda. La rizo maturiĝas kaj la rizejoj pli kaj pli flaviĝas. En iuj vilaĝoj oni komencis la rikolton. Per serpoj la virinoj tranĉas spikojn etfaske. La rizo estas portata sur la randojn por sia elgutigado kaj supraĵa sekigado. Poste ĝi alvenas homŝultre en la farmodomon, kie ĝi estas mandraŝata. Viroj senĉemizaj kaj sensuaj kaptas la garbetojn per la tigo kaj forte batas la spikojn en iom oblikvaj lignokasetoj. Tiel la greno estas kolektata en la malsupro kaj laŭmezure ensakigata.

En aliaj lokoj malpli favorataj oni akcelas la maturiĝon, plenigante la rizejon ĝis la spikoj. Tiel, laŭ mi, krom la rektaj sunradioj, ili ricevas ankaŭ la reflektitajn.


Kiam la kanalo estas pli malalta ol la rizejo, oni suprenigas akvon per norio movata de du-tri personoj. De malproksime oni kredus ilin sciuroj, saltetantaj sur la rado. Tiel mi vidis senakvigi laĝeton por kolekti fiŝojn en la koto. Vere, tiu homa laboro ege impresis min.

Estas ankaŭ la momento, kiam oni plukas kaj sekigas la persimonojn, kiel en Aĝenio la prunojn.

Fraŭlino INAKO KUDA

Por mi Fraŭlino INAKO KUDA estis "mesio". Tiu 20-jara esperantistino estas filino de eminentulo en TSURUGA kaj tial ĝuas grandan influon en Japanio. Iom post iom mi konsciis, ke mia restado kaj la varma akcepto ĉie ricevita en Japanio estis aranĝitaj de ŝi. Ni fariĝis geamikoj, ŝi princino kaj mi nura proleto. Longe ni korespondis eĉ post mia reveno. Kaj ŝian simplecon, gracion, diskretecon kune kun perfekta scipovo en esperanto mi volas omaĝi.

Alfa-Beta (daŭrigota)



LA NUBETO
kaj LA PRINTEMPO

La nubeto estis tre malgaja. Jam de tre longe li promenis en la ĉielo kaj la tuta blua spaco ŝajnis al li monotona.

Kiam estis hela vetero, li ekvidis la teron. Ĝi aspektis al li malsama de tio, kion li konis :

"Ŝajnas, ke ĝi farbiĝis, estas tie ĉi kaj for tie grandaj verdaj kvadratoj" - dum li konis ilin kun ilia malgaja bruna koloro. Li opiniis tion pli beleta.

Li vidis ankaŭ etajn blankajn makulojn kaj etajn punktojn ruĝajn, blujajn, flavajn, malv-kolorajn. Tio estis multkolora ! Kia ĝojo vidi alion, ol malgajajn malhelajn kolorojn, ol la grizon de l'fumo, la brunon de la dumvintre forlasitaj grundoj kaj tiun unuformecon de la malmultaj preterpasantoj !

Nun ĉio ŝanĝiĝis ! La knabinoj elmontris pimpajn, kolorajn robojn kaj kiom da homoj ! La aeron plenigis parfumo de freŝe elvolvitaj floroj. Kiel agrable !

Li komprenis, ke tio konsistigas la naskiĝon de l'printempo, pri kiu tiel ofte parolis al li liaj gepatroj. Fine ĝi alvenis, tiu mirinda sezono, dum kiu ĉiuj estas tiel feliĉaj !

Certe, li promenos malpli ofte, ĉar en tiu periodo la nuboj malmultiĝas, sed li ne plu sentis sin sola. La birdoj ree flugos kaj iliaj kantoj denove sonos por gajigi la vivon.

Kaj eble ankaŭ la viroj kaj la virinoj, pli feliĉaj antaŭ la etaj ĝojoj de la tute nova naturo, iom kantos de tempo al tempo !

Nu jes, nubeto, en printempo oni estas frenezeta. Printempo donas feliĉon !

J.P. Hennebois.

VIVO DE "LAŬTE!"

Bilanco 1981

Kasbilanco : en francaj frankoj.

Abonoj + donacoj	4790,01	Eldonkostoj	3040,90
Antaŭa saldo		Afrankokostoj	974,72
(fine de 1980)	2393,88	Nova saldo	3168,27
	7183,89		7183,89

Malgraŭ plialtiĝo de la diversaj kostoj (papero, afranko) la bilanco restas pozitiva, kio ebligas plu teni etkosta la abonprezon : tial, apartan dankon al ĉiuj, kiuj sendas pli ol la petitan prezon !

Enhavo de "Laŭte!" En 1981 aperis 8 numeroj (pli ĝuste 7½, ĉar la lasta estas dec.81/Jan.82) plus la kutima adresaro, sume 272 paĝoj (242 en 1980). Eĉ la nature pesimismema redaktanto devas konfesi, ke "L" ĉi-rilate bonfartas : abunda materialo ĉiumumere alvenis kaj certigis varian enhavon. Fidela kontribuantaro pruvas, ke la formulo uzata en "L" estas verkinstiga kaj ŝatata de la legantaro. Ne mankas la laŭdoj al "Laŭte!" ! Sed estas preferinde emfazenda jena ĵus ricevita kaj aparte trafa vidpunkto de legantino : "Mi trovas, ke tro ofte temas pri Larzac, Golfech, mizogineco...kaj ĉiuj "ĉeval-etoj", pri kiuj ŝatas paroli aŭ skribi malmultnombraj esperantist(in)oj, kiuj diras sin "kleraj", kaj fine estas nur grumbl-etoj, se ne teduloj ! Kaj mi pensas, ke ofte iliaj skribadoj temas pri tiuj temoj, ne por ŝanĝi ion ajn en la aferoj, sed nur por doni al si bonan konsciencan ! Multaj, kiuj skribas en Laŭte, ofte havas eblecon vojaĝi, ĉu ili povus rakonti siajn spertojn kaj impresojn dum siaj vojaĝoj ? Ĉu ili povus esti pli gajaj, humuremaj ? Ĉar humuro ŝajnas ofte strange manki ĉe kelkaj E-ist(in)oj !..." Sed nia moto restu : "Ĉiu skribu laŭ sia emo"...

Abonantaro : Malgraŭ malapero de dudeko da donacitaj abonoj la abonombro restis stabila (288 ; 281 en 1980). La varbado per reklam-anoncoj ne efikas : tial multo dependas de la abonantaro mem. Dankon al ĉies helpo ! Jam kvardeko da novaj legantoj en 1982.

Perantaro : En Italio nia amiko A.Panerai, pro malbona sanstato, rezignas la perantan taskon. Superŝtate, ankaŭ nia amiko José Bernabéu en Hispanio. Por tiuj du landoj estas bonvena la helpo de novaj perantoj. Dume, la tieaj legantoj bonvolu reaboni

rekte sendante la monon per poŝtgiro al nia poŝtkonto en Francio. Dankon !

Desegnoj : Ho ve, malfacilas longe ĝui! La muzo de nia (kaj alies) desegnistaro H.Elik-Sire ekstrikos post du-tri numeroj. Ĉies - alies - muzoj estas dungeblaj ! Ni povas relative facile represi desegnojn per elektronaj stenciloj. Atentu tamen la formaton kaj la netecon de l' desegnoj... Redankon ! Kribo.

***** SAT-Broŝurservo, fino de p.24 *****

Aparte grava estas la sumo donacita. La "transĝiroj" fontas el mono adresita al la broŝurservo kaj celanta fakte la kason de "Laŭte!". La ĉi-jaran deficiton kaŭzas ĉefe la aĉeto de stencilgravurilo, "brokantaĵo", kiu fakte preskaŭ ne estis uzita antaŭ ol fariĝi posedaĵo de la servo. (Tiu aparato kompreneble utilas ankaŭ al "Laŭte!"). Krom papertranĉilo kaj tiu stencililo, la "kapitalo" de la broŝurservo kuŝas sur bretoj aŭ en kestoj : pli ol 9000 broŝuroj, kun prezoj de 1 ĝis 15 FF.

Estus freneze plialtigi la stakon...

* *

Dume, plu validas la oferto pri samtempa reabono al Laŭte + broŝura serio 82. Sed, ĉar la broŝurulo intertempe perfide eldonis 2 pliajn broŝurojn, estu feliĉaj la prokrastintoj ; nun tiu oferto konsistas el :

- El Verkoj de Lanti 1 kaj 2.
- Migrante tra Metioj (Valo)
- Argentina Novelaro (3a serio)
- Imaga dialogo Marks/Bakunin
- Historio de SAT 1953/1981
- Laŭte 1982 + adresaro

sume :

65 FF

Kompreneble, kiuj jam estas broŝurabonantoj, ne zorgu pri tiu oferto. Ili ricevos - aŭ jam ricevis - ĉion je la kutimaj favoraj kondiĉoj. Se iuj el tiuj broŝurabonantoj jam ĝiris 60 FF por "BS + Laŭte", ili trankviliĝu : la broŝur-mono aldoniĝis al ilia konto.

Ha, kiom da komplikaĵoj...!

Kribo.

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire 58651
